FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA · H E F ·

# BOLETIN

Núm. 1

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

## NUESTRO SALUDO

Hace exactamente un año que, tras penosos esfuerzos y ansiosos anhelos, los desperdigados esperantistas españoles, restos de aquella importante grey de hace algunos años, lograron de los poderes públicos su constitución legal en sociedad. Los que, en ese tan próximo pasado, pudieron vivir el momento en que se nos comunicó tan grata nueva, no olvidarán nunca la entusiástica recepción que se le hizo; *reunidos para festejar*, el 15 de Diciembre, la *memoria* de nuestro inolvidable Fundador, llegó la noticia en el mismo momento en que, llenos de alegre camaradería, íbamos a sentarnos a la mesa. Todos los concurrentes celebraron con júbilo su conocimiento, y la fiesta tuvo, desde aquel momento, una doble significación; aquella fecha señaló un hito memorable en la historia del esperantismo español.

Quedó entonces constituída la HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO, y, gracias a ella y a los esfuerzos de un grupo *de entusiastas esperantistas, se pudo dar un impulso* notable a la propagación de nuestro idioma auxiliar en España.

Pero nuestro anhelo perseguía un objetivo inmediato que, dadas las dificultades del momento y nuestros escasos medios, nos parecía utópico alcanzar: una Revista, un Periódico. Apuntábamos demasiado alto; la realidad nos detenía con su marmórea mano, y, ateniéndonos a ella, venimos hoy a ofrecer a los esperantistas españoles, a los socios de la H. E. F., lo único que podemos, a costa de cuantiosos esfuerzos, presentarles *como lazo de fraternal unión, instrumento de propaganda* y *medio de perfección* lingüística: el BOLETIN de la H. E. F.

Como exponente de la vida espiritual de nuestra Federación, su objetivo es bien claro: «Propagar el Esperanto, procurar el perfeccionamiento de nuestro idioma auxiliar entre los esperantistas, y lograr en España el más alto nivel posible, que nos ponga en plan decoroso con respecto a otras naciones y, llegado el momento, se pueda decir que en España se cuenta con una masa esperantista suficiente para que se pueda oficialmente implantar su *estudio obligatorio, contando con un cuadro* de competentes profesores, capaces de enseñarlo y difundirlo.

Al aparecer, este BOLETIN se complace en honrar la memoria del inolvidable Dr. Zamenhof, creador genial del Esperanto, y de todos aquellos que batallaron por su difusión, entre los cuales recordamos a muchísimos españoles.

Saludamos cordialmente a los antiguos esperantistas; a todos los que envejecieron en la demanda, *cejando en sus esfuerzos*, pero no en su ilusión; a los que, jóvenes todavía, siguen batallando por conseguir nuestro pacífico *y bello ideal*; a *los recientes adheridos* a nuestro *movimiento*, que desmienten con su fe la creencia de que la juventud actual sólo se deja guiar por móviles materialistas.

Por medio del ESPERANTO, llegar al corazón de todos...

**EL FUNDO DE NIA KORO, KUN GRANDA FERVORO, NI DEZIRAS AL LA HISPANA ESPERANTISTARO, KAJ EKSTERLANDA KOLEGARO, MULTE DA PROSPERO DUM LA TUTA JARO 1949a POR LA BONO DE NIA KARA LINGVO!**

# FACETAS DE LA DIFUSION DEL ESPERANTO

● El Esperanto se difunde en los medios más diversos; ello indica que todos comprenden su necesidad. La Iglesia Católica, que tantas veces ha demostrado su interés por el idioma auxiliar, y que cuenta hoy con revistas, asociaciones y organizaciones de enseñanza, sigue difundiéndolo activamente, y así, leemos en el número 132-133 de «La Praktiko», que el Padre Modesto CAROLFI, el conocido franciscano, ha comenzado en Roma, en el Ateneo Franciscano, un curso de Esperanto para jóvenes franciscanos, pertenecientes a las más diversas nacionalidades y lenguas; el éxito de su curso es enorme, y los estudiantes siguen con entusiasmo sus lecciones.

No sólo en su comunidad, sino en los más diversos campos se extiende la activa propaganda del Padre Carolfi; para maestros, estudiantes universitarios y público en general.

Desde estas columnas, felicitamos al activo apóstol de nuestro idioma, que tan alto pone el exponente del esperantismo en los medios romanos.

● En latitudes completamente opuestas, en la remota Islandia, en donde tan extendido está nuestro idioma auxiliar, el Dr. A. MILDWURF, de Londres, está dando un curso de perfeccionamiento que está alcanzando gran resonancia. Dentro de poco, no quedará nadie en Islandia que desconozca el Esperanto...

● En todas las actividades humanas se capta la utilidad del conocimiento del Esperanto. Sabíamos de muchos cursos de nuestro idioma para la Policía en diversas naciones; hoy nos llega la noticia de un nuevo curso para policías en La Haya; hasta hoy; son 85 los inscritos en él. Lo dirige el Sr. BLAAUWBROEK.

● La K. L. M., la famosa compañía de navegación aérea, para resolver los múltiples escollos de la pluralidad de idiomas que, en un sólo día pueden ocurrir, y ocurren ciertamente durante un vuelo, está cuidando la adopción del Esperanto para sus informes, guías, etc.

Pídanle folleto gratuito sobre sus servicios, a la siguiente dirección: Cefoficejo de la K.L.M., Sekcio Informservo.—Raamwerg, 90.—DEN HAAG (Nederlando).

● La actual utilidad del Esperanto es muy conocida de aquellos que han empleado el idioma auxiliar para solicitar informes, datos, libros, etc., del extranjero, aunque fuera indirectamente, por medio de los Delegados, que se han preocupado de servir a los «samideanos» en sus demandas. Por eso, los esperantistas se sonríen con un tanto de conmiseración cuando las llamadas «personas sensatas» les dicen despectivamente al oir hablar del Esperanto: «Bueno, y eso ¿para qué sirve?». Pues «Eso», sirve para conocer un idioma tan maravilloso que, como decía hace poco un recién convencido: «Aunque nadie más que yo conociese el Esperanto, y no pudiese hablarlo con nadie, el sólo placer de conocerlo, admirar su sorprendente estructura, leer los miles de obras admirables que en Esperanto están escritas, originalmente o traducidas, ya vale la pena de tomarse la ligera molestia de estudiarlo y saberlo». Pero el Esperanto ofrece realidades mucho más prácticas para quienes lo conocen. Tener amigos en todo el mundo, que le ponen en contacto con los más diferentes y lejanos puntos de la tierra; amigos que le ofrecen acogida familiar en sus viajes; que le guían y aconsejan, y, si es preciso, le defienden. Camaradas de la misma profesión que intercambian opiniones sobre las materias de estudio o trabajo. Y, sobre todo, ensanchar desmesuradamente la conciencia de que, al ser esperantista, el mundo exterior deja de ser algo incógnito e intangible, esto es, gozar de una conciencia mundial.

● Mientras en Malmö reinó la mayor comprensión entre congresistas pertenecientes a más de 30 países distintos, que expusieron, discutieron y aprobaron conclusiones, gracias al Esperanto, en París, los representantes de la O.N.U. siguieron haciendo el ridículo. En cinco idiomas distintos, expusieron, discutieron... y nada arreglaron, después de tener que traducir más o menos fielmente lo hablado, a costa de un sistema muy costoso e imperfecto de traducción múltiple. Y eso que los representantes en la O.N.U. son gente instruída. Pero no se han enterado de que todavía se están alumbrando con velas de sebo...

● El pasado 15 de Diciembre, fiesta del Esperanto en todo el mundo, los esperantistas valencianos se reunieron, para honrar la memoria del Dr. Zamenhof y, al mismo tiempo, apretar aún más los lazos de fraternal afecto entre los componentes del grupo. Reunidos en animada cena, se cambiaron impresiones, se comentaron las últimas noticias acerca del movimiento esperantista en España y en todo el mundo y se apoyó la idea de publicar el Boletín, como vital elemento de sostén para nuestro movimiento cultural. Al finalizar la reunión, el samideano Hernández, magnífico escritor, autor de la versión esperantista de «El Ingenioso Hidalgo Don Quijote de la Mancha», con estilizado verbo, glosó el motivo de la reunión, haciendo resaltar que, si bien nuestras reuniones tienen casi siempre lugar alrededor de una mesa, y ante reconfortante cena y con alegre y optimista charla, no por eso dejan de ser serias por sus resultados, ya que esas reuniones marcan los jalones que nuestro grupo deja en el camino de la propaganda activa. Y es que eso es el Esperanto: el respeto a las costumbres, idioma, religión e historia de cada pueblo. Dar a cada nación el medio de poderse relacionar con las demás, pacíficamente, por medio de un lenguaje neutral, sin la humillante supeditación a otro idioma, más o menos en boga.

Con el aplauso unánime de la concurrencia terminó la encantadora «parolado» de Hernández, y todos hicieron votos para que, al reunirse de nuevo, quede marcado un nuevo paso en la progresión del Esperanto en España.

---

# NIA UNUA PRELEGO

La kuracistaro estas profesia klaso plej scivolema pri ampleksigo de sciencaj horizontoj. Multaj el niaj plej elstaraj esperantistoj estis anoj el tiu bonfaranta profesio. Ni ne devas forgesi ke nia amata Fondinto estis meritplena okulkuracisto. Tio klarigas kial la salonego de la «Instiituto Médico Valenciano» estis plenplena kiam, la 5an de Junio, nia kara samgrupano Dr^o^ Rafael Herrero prelegis pri «Esperanto, kiel helplingvo por kuracistaj studoj».

La preleganto komencis sian lekcion menciante la balbutajn provojn faritajn en Hispanio por skribi kuracajn metodojn; unue, en latina lingvo, kaj en ĝia vulgara filio; poste, en araba lingvo, per kiu la kuracaj metodoj atingis dum Mezepoko, la plej altestimatan nivelon en Eŭropo.

Tiuj estis, jam, internaciaj lingvoj; sed, iom post iom, la diversaj nacioj diferencigis siajn lingvojn, kaj, de tiam, ĥaoso fariĝis.

La preleganto citis la plej elstarajn kuracajn verkojn de hispanaj sciencistoj tra jarcentoj. Paralele, li ankaŭ menciis la klopodojn de meritplenaj pioniroj de helplingvoj ,de Hildegardis ĝis Zamenhof, sen forgeso de la bona parto de hispana kontribuo al tiu bona celo, fare de Sinibaldo de Mas, kaj de Sotos Ochando. Tute kortuŝa estis la citado de la penoj de Zamenhof, kiuj multe interesis la aŭdantaron.

Poste, li analizis la valoron de ĉiu konata lingvo por ĝia adoptado kiel helplingvo por kuracaj studoj. Tute speciale li analizis la nulecon de Basic English, kaj la aŭdantaro bone ridis kiam la lekcianto provis diri en tiu elpensita lignvo kelkajn simplajn trazojn; ĝia neebleco klare aperis al ĉiuj, kiuj bone taksis la mirindecon de tiu «eltrovaĵo».

El tiu ĥaoso, en kiu kuŝas nuntempe la medicinaj studoj, nur Esperanto taŭgas por forigi la babelan konfuzon; tion bone elmontris nia samgrupano, kiu, antaŭ la fino de ĝia prelego invitis al kuracistaro al serioza konsidero de tiu fakto kaj proponis la kreadon de la Kuracista Esperantista Asocio.

Densa aplaŭdado premiis la lekcianton kiu ricevis poste varmajn gratulojn de la aŭdantaro. La valencia gazetaro respegulis favore tiun prelegon, kaj multaj kuracistoj promesis aliĝi al la nova K. E. A.

# INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Jen kara leganto, mi legis por vi kelkajn ĵus aperintajn gazetojn internaciajn; la ekstera aspekto de nia gazetaro tre multe pliboniĝis. Plej bela per siaj ĉarmaj ilustraĵoj estas «LA PRAKTIKO», kiu aperigas longan kaj allogan artikolon pri la sankta monto kataluna «Montserrat»; frontpaĝe aperas fragmento de oficiala decido de «Internacia Ruĝa Kruco», kies nederlanda sekcio invitis reprezentantojn de plej gravaj nederlandaj unuiĝoj al sia lasta Kongreso por studi plej efikajn rimedojn por la tutmonda paco; inter la invititaj organizoj ĉeestas ankaŭ la esperantistaro.

En la fama aŭstria universitato de Insbruck stariĝis lektorato por Esperanto laŭ dekreto de la aŭstria federacia Ministro por instruaj aferoj.

Sekvas en vico la veterana «HEROLDO» kun pensigaj artikoloj sur la unua paĝo pri la minacantaj nuboj, kiuj ŝvebas super la mondo nuntempe; sub la honesta vidpunkto de la esperantisma idealo oni vokas la homojn al komprenemo kaj reciproka toleremo.

Ankaŭ estas interesa intervjuo kun delegitino de UEA en San Francisko, kiu respondinte demandon deklaris: «En Usono, homoj ĝenerale povas interkompreniĝi per la angla lingvo aŭ, pli ĝustadire, per ĝia amerika dialekto. Tial la neceso de Esperanto ne sentiĝas tiel urĝe kiel en Eŭropo. Tamen, ankaŭ en Usono nia lingvo iom post iom gajnas terenon. En Kalifornio ekzistas pluraj agemaj kluboj; sed la laboro por nia afero estas multe pli malfacila ĉe ni ol ĉe vi, en Eŭropo».

La bildo de Clara Barton, esperantistino kaj fondintino de la Amerika Ruĝa Kruco aperis en pasinta septembro sur memora usona poŝtmarko de tri cendoj. Ŝi naskiĝis en la jaro 1.821a kaj mortis en 1.912a; ŝi organizis la zorgon pri la vunditoj en la usona civila milito kaj en la franca-prusa milito; kiam ŝi estis jam 90-jara (jen do kia ekzemplo) ŝi lernis Esperanton, ĉar plene ŝi konvinkiĝis pri la neceseco kaj graveco de nia internacia lingvo. Por la esperantstaj filatelistoj la posedo de tiu poŝtmarko estos grava laŭ duobla senco... eĉ triobla se ili estas maljunaj!

Plensukcesaj estis la sekvantaj naciaj Kongresoj. La 2-a Slovaka Esperanto-Kongreso okazis en Košice kun partopreno de pli ol 300 delegitoj; rimarkinda estas ja la detalo ke, kvankam la Kongreso estis nacia, en la laborkunsidoj oni parolis nur esperantlingve. La 31-a Bulgara Esperanto-Kongreso okazis en Jambol, kaj ŝi estis unu el la plej bone organizitaj ĝis nun en la balkanaj landoj.

La londona revuo «ESPERANTO» daŭre aperas tre bone redaktita. La korpremo de la nuna tempo ankaŭ sentiĝas en tiu ĉi gazeto; ĉefaj konsideroj speguliĝas, antaŭ tiu grava problemo, en la sinteno de ni, esperantistoj.

Unue: ni malfidu ĉiam ĝeneraligan informon; ni malaprobu manieron prezenti unu flankon kiel nigran, la alian nur blankan.

Due: Ni vidu en ĉio nur la homon, tia, kia li estas, laŭ siaj agoj.

Jam en la internaj paĝoj sekvas laŭda nekrologa artikolo pri S-ro. Beneŝ, eksprezidanto de Ĉeĥoslovakio, kiu meritas apartan simpation de la esperantistaro ĉar li subskribis en la jaro 1.920a kun aliaj naŭ registaraj delegitoj la faman rezolucion, kiu invitis la Ligon de Nacioj informiĝi pri Esperanto, kio kondukos rekte al la diskutado de la tuta problemo.

Leginda estas la studo kun loga titolo «LA TRANSKRIBO EN ESPERANTON DE PERSONAJ NOMOJ». Mi povas fari mencion nur pri la titolo de ĝiaj partoj kun la konkludo, kiun la aŭtoro mem tiras.

Jen ili estas: PERSONA NOMO.—Konkludo: tradukebla kaj transskribebla

estas senescepte nur la voknomo. KLASIGO DE VOKNOMOJ.—Konkludo: Ne tradukú en Esperanton voknomon, se tiú ĉi esprimas ideon ĝeneralan. La bibliaj formoj estu transskribataj atentante originan hebrean formon plej proksiman al la ortografio de naciaj lingvoj. Ankaŭ povas esti transskribataj en Esperanton, kun la propra karaktero de la lingvo, la nomoj el grek-latina origino. La nomojn ne transskribeblajn uzu en la formo propra de la origino uzante internacian ortografion. VIRINAJ NOMOJ.—Konkludo: Virina voknomo povas esti transskribata per aldono de O aŭ per IN. VOKNOMOJ ESPERANTAJ.—Nenio ilustras pli bone la altirpovon de nia lingvo kaj movado aŭ la fortan impreson, kiu ĝi kreas sur la animo, ol la multaj propraj voknomoj, kiuj ekzistas en Esperanto rekte kreitaj el nia vortmaterialo, ĉu imitante nacilingvan nomon, tradukante ĝin, ĉu serĉante ion novan. Atentema leganto de esperantistaj gazetoj povas sufiĉe ofte renkonti nomojn oficiale uzatajn, do akceptitajn de la aŭtoritatoj: Etulino, Milda, Benita, Aminda, Glora, Gracia, Esperantina, k. t. p. Cu estas necese klarigi, por pli bona kompreno, ke «voknomo» aŭ «antaŭnomo» egalas al hispanlingva «nombre» kaj la vortoj «familia nomo» aŭ «nomo» simple al nia hispanlingva «apellido»?

Kompreneble, ceteraj paĝoj ŝtopiĝas per agrablaj literaturaĵoj kaj versaĵoj, sed mi penis nur doni al vi etan resumon de ĉio plej grava aŭ plej interesa el pure esperantista vidpunkto. Ni ĉiuj devas tamen klopodi por fine povi aboni la internaciajn gazetojn kaj revuojn pagante ilin kaj rekte ricevante ilin kun redakcia banderolo. Mi opinias, ke plimulto el la hispana samideanaro ĝojus se tiu ĉi nuna revo efektiviĝos kiel bela realo. Gis tiam daŭros zorge legante por vi ĉiuj

LA LEGEMA KOBOLDETO

---

DOMO KONSISTAS EL BRIKOJ

Fundamenta aspekto de la esperantista vivo estas la ekzisto de multnombraj, bone organizitaj kaj funkciantaj lokaj rondoj. Kie tiaj grupoj ekzistas, propagando fariĝas facila kaj efika kaj nia kara afero antaŭeniras.

Tial estas nepre necese ke en ĉiu urbo kaj vilaĝo niaj samideanoj klopodu krei tiajn rondojn en la kadro de HEF, organizi regulajn kunvenojn, distrajn kunsidojn kaj letervesperojn; kaj per ili altiri la atenton de la ĝenerala publiko al nia afero.

Ni povus ĉi tie citi, kiel tiuspecan modelon, kelkajn nun ekzistantajn en Hispanio rondetojn, kiuj senlace kaj entuziasme bone laboras por Esperanto. Sed ni nur reliefigas la bonegan agadon de la samideanoj el Tarrasa, kiuj sub la lerta kaj kompetenta gvidado de nia admirinda federaciano Chaler Arnau, konstante hejtas la sanktan fajron de nia verda idealo. Estas facile konjekti, ke tian bonegan rezulton ne povas atingi izolita esperantisto, eĉ la plej entuziasma, nek nesufiĉe unuigitaj samideanoj. Laboro de unuopuloj, kvankam laŭdinda kaj meritoplena, ja ne povas esti tiel efika kaj fruktodona, kiel tiu de unuece por la sama celo laboranta grupo.

Konvenas, do, ke ĉiu HEF—ano kunlaboru tiucele kun siaj samurbanoj kaj oni kreu grupojn aŭ rondetojn, finance memstarajn, kaj organizu viglan, socian vivon esperantistan. Pafu viajn propagandsagojn en ĉiun direkton, sed plej ofte en tiujn sektorojn, kiujn, pro ilia speciala, faka intereso ne limigita de landlimoj, oni povas pli facile venigi al ni: filatelistoj, ŝakludantoj, lingvolernantoj, korespondemuloj, k. t. p. Jen la, miaopinie, unue pluginda grundo!

# TAŬROLUDO

En la maja numero de ESPERANTO, aperis artikoleto de nia elstara samideano E. E. Yelland pri «Batalo inter animaloj». Gi relatis al taŭroludado, tio estas, al la tipa nacia festo en Hispanio, Hispanameriko kaj ankaŭ ludata en suda Francio.

La aŭtoro priskribis iom strange kaj ne tute ĝuste la spektaklon, kiun li severe mallaŭdis.

Rilate al la priskribo, mi nenion deziras korekti. Pri la juĝado, mi eĉ estus pli malindulga. Tamen, ĉar ke la kritiko de samideano Yelland ne estas la unua kiun mi legis de fremda observanto de la «hispana nacia festo», mi deziras, ne kontraŭpartie sed aliflanke, aldoni la opinion de tute ordinara kaj senpartia hispano, kiu mi estas.

Taŭroludado estas ankoraŭ tre ŝatata de hispana amaso, kvankam lastatempe tre konkurencita de futbalo, kiu, iom post iom, estas pli ŝatata de junularo. La ĉefaj kontraŭstarantoj de taŭrofesto ne estas sentimentalaj eksterlandanoj, sed la hispanoj mem. Ciuj rememoras, en nia lando, la bruantajn kampanjojn de la fama jurnalisto E. Noel kontraŭ la tipa festo. Hodiaŭ, la plejmulto estas kontraŭ aŭ indiferenta pri taŭroludado.

Sendube, neniu nacio havas feston tiom pentrinda, tipa, multkolora kaj emocia ; tiuj kiuj plej ŝatas ĝin estas... eksterlandanoj !

Bedaŭrinde, ĉio okazas sur sanga kaj kruela bazo, kiun hispanoj plej akre kondamnas. Ni akceptas humile la gravan kulpon pri tio, sed... Cu similajn kulpojn ne havas aliaj nacioj ?

Cu frakasi nazojn, krevi okulojn kaj nokaŭti ĝis morto malfeliĉulon estas akademia angla ŝerco ?

Cu «Kaĉaskaĉkane» tordadi brakojn kaj krurojn ĝis rompiĝo estas amerika kanteto ?

Oni argumentos, eble, ke boksistoj kaj luktistoj ne estas, ja, senkulpaj bestoj. Certe, kaj ĝuste pro tio la spektaklo pri homa sango estas ankoraŭ pli sovaĝa, ĉar la publiko partoprenas la lukton demandante pli kaj pli laŭte la nokaŭtigon... eĉ la mortigon !

Pri turmentado kontraŭ bestoj, taŭroludado ne havas la ekskluzivecon. Kion, pri sategado de anseroj ĝis krevado, por obteni «Foie-gras» ? Ĉu dresado, de diversaj bestoj estas nur obtenita per mildaj rimedoj ? Ĉu kastrado de dombestoj ne estas doloriga kaj hontinda praktiko ?

Pri krueleco de taŭroludado, ni konsideru objektive la aferon. Taŭroludeblaj bestoj estas bredataj dum tri aŭ kvin jaroj en paŝtejoj, kie ili nur promenas, kuras, paŝtas, kaj atendas, sen laboro, nek batoj nek ŝvito. Je la fino, nur dekkvin minutojn daŭras la torturo !

Alilande, la sama besto estus torturita pli kruele por esti kastrita, dum dekkvin minutoj, ĉiam, celante la pligrasigon de la besto... kaj de la profito. Poste, sekvus kvin, ses, sep jaroj de laboro kaj ŝvito ; batita, lacigita, ĉiam por la plej granda profito de homo, kiu, finfine, ne premios ĝian servon embalzamante ĝin, sed buĉante ĝin senkompate. Ĉu la diferenco estas tiom granda ?

Certe, taŭroludado estas sanga kaj sovaĝa festo ; kiel spektaklo, ne estas deca por sentemaj personoj, sed alilande oni ne sin dorlotas per sentimentalaj kanzonetoj !

Kaj, paroli pri krueleco, kiam ni ankoraŭ naŭzas pri Belsen, Auschwitz... Hiroshima !

R. H.

---

REDAKTEJO

Pri administrado kaj redaktado de nia BULTENO adresu ĉion al :
HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio)

## IOM POST IOM

TARRASA.—Sub la gvidado de veterana samideano Sebastián Chaler oni malfermis kurson kun ĉirkaŭ 40 lernantoj. Estas ja laŭdinda la por Esperanto—agado de nia malnova amiko, ĉar malgraŭ lia 65—jaraĝo li firme staras ĉe sia posteno en nia paca armeo.

Loka ĵurnalo «Tarrasa» ofte publikigas notojn kaj artikolojn favore al nia afero.

En grava Hora Societo «Juventud Tarrasense» (Tarrasa Junularo) estas fondita Esperanta fako. Tiu ĉi societo estas unu el la plej gravaj kaj malnovaj el Katalunio ĉar gia fondiĝo estis en jaro 1.858. Ni petas al ĉiuj samideanoj ke oni sendu gratulleterojn al tiu societo sub tiu ĉi adreso: Prezidanto de Sociedad Coral Juventud Tarrasense —Esperanta Fako. San Francisco, 52— TARRASA (Hispanujo).

REUS.—Leemos en el periódico «Lérida» del 25 de octubre último:

«EXPOSICION DE ESPERANTO. —En el Centro de Lectura y organizada por los elementos esperantistas locales, en colaboración con los más destacados de la región catalana, y con el beneplácito de la Federación Esperantista Española, oficialmente autorizada, el pasado sábado se inauguró con gran éxito la EXPOSICION DE ESPERANTO, que durará hasta el primero de noviembre próximo, que presenta libros al público, revistas, carteles, tarjetas postales ilustradas, folletos, etc., escritos en el idioma auxiliar internacional para demostrar, una vez más, el uso y la utilidad del maravilloso idioma neutral Esperanto, lengua viva y adaptable a todos los usos.

Dicha exposición está siendo muy concurrida y favorablemente comentada por todos los asistentes.»

## KLERULO!

Foje, en Trankvilando, la observatoriaj astronomiistoj registris sismajn skuojn, kies epicentro kuŝis en la najbaraĵo de Palurbet.

Tuje, ili sciigis tion al koncerna Provincestro, kiu, siavice telegrafiis al urbestro de Palurbet jene: «Sismaj movadoj okazontaj ĉe via urbo. Mi scias epicentro situas en Palurbet. Zorgu energie kaj evitu mortigadojn».

Du tagojn poste, la provincestro ricevis de la urbestro tiun telegramon: Sisma movado abortigita. Epicentro kaj tri aliaj ulaĉoj, arestitaj».

## KONSTERNIGA CIKONIO

Ili tri estis la plej belaj cikonioj apartenantaj al la fabela servo por disdonado de beboj en la decajn hejmojn.

La unua aspektis gaja; la dua, tute ĉagrenita; la tria, moke ridetanta.

La unua diris: «Mi estas gaja, ĉar mi ĵus kondukis belan bebon en riĉan domon, kie ĉiuj aspektis tre ĝojplenaj pro mia alveno».

La dua diris: «Mi estas ĉagrenita, ĉar mi alportis malgrasan infaneton en mizeran domon, kie ĉiuj aspektis tute malĝojaj pro mia donaco».

La tria, duone sufokita pro retenita rido, diris: «Ha, ha, ha¡ Mi havis nenion por servi, kaj, ŝerceme... mi aperis sur kameno ĉe fraŭla sekretariino!»

## SPRITAĴO

La Instruisto.—Kiu skribis sur la nigran tabulon «La instruisto estas idioto»?

Lernanto.—(timeme) Estas mi.

La instruisto.—Bone, ĉi tiun fojon mi pardonas vin pro tio ke vi sincere diris la veron.

«ZAMENHOF, INICIADOR DEL ESPERANTO», por A. López Luna. Ediciones Vertiente. Buenos Aires.

En sencillo y agradable estilo, el autor nos muestra en este libro una visión completa de la vida del Maestro, deteniéndose con especial delectación en los años juveniles de Zamenhof y haciendo participar al lector de los afanes e inquietudes del joven estudiante obsesionado por la idea de dotar a la humanidad de un instrumento de comprensión que contribuyera a unir los pueblos del mundo en un común sentimiento de amor y mutua estimación.

A través de las páginas del libro, que todo esperantista leerá con delectación, se destaca con extraordinario relieve la poderosa personalidad del creador del Esperanto, entregado a sus sueños e ilusiones en medio de un mundo atormentado por los odios raciales. La figura del Maestro, trazada con vigorosos trazos, adquiere proporciones extraordinarias en su lucha contra las dificultades de su empresa, sin hacer caso alguno [illegible] compañeros y amigos, e incluso de sus profesores, que tildaban al joven Luis de iluso y maniático.

El estilo, en general, es excelente, si bien ofrecerá al lector español algún americanismo un poco extraño para nosotros. Excelentemente presentado e impreso sobre buen papel, el libro del samideano López Luna es digno de figurar en la biblioteca de todo buen esperantista.

GAPULO

## CURSOS

Significamos a todos los esperantistas la necesidad absoluta de abrir cursos, para formar nuevas generaciones e injertar nueva savia en nuestras filas.

También insistimos en la conveniencia de organizar grupos, con reuniones periódicas y muy frecuentes, en las que sólo se hable la lengua auxiliar, para perfeccionarse en su uso y demostrar a todos su utilidad.

## NOKTA AVENTURO

Du turistoj, piedirintaj dum la tuta tago en la montaro, venis vespere en vilaĝan gastejon.

Ĉar ili estis lacegaj, ili eĉ ne vespermanĝis, sed luis ĉambron kaj iris tuj dormi. Kiam la lampo estis estingita, ili konstatis, ke la aero en la ĉambro estas tiel sufoka, ke neniu el ili povas ekdormi.

—Kie estas la alumetoj? — demandis Johano.

—Ni havas neniajn? — respondis Georgo.

—Mi nenion vidas, sed malgraŭ tio mi iras malfermi la fenestron — diris Johano.

Li ellitiĝis kaj palpserĉante iris tra la ĉambro. Post momento li venis al granda vitra tabulo kaj ekkriis:

—Mi jam trovis ĝin, sed ne povas ĝin malfermi.

—Do, rompu ĝin! — rediris Georgo.

Johano prenis sian ŝuon kaj jam aŭdigis tra la ĉambro la sono de falantaj vitropecoj.

—Nun ĝi estos bone — diris li kaj revenis en sian liton.

—Certe — respondis Georgo. — Oni ja eĉ ne povas dormi sen aerinterŝanĝo.

Kaj ili ambaŭ profunde ekdormis.

Sed imagu, kia estis ilia surprizo kiam ili matene vekiĝis kaj vidis ke la fenestro estas netuŝita, sed la vitra pordo de granda libroŝranko estas rompita je pecoj!

(De «Esperantisto Slovaka»

## ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn, kiuj rilatos al nia afero. Du vortoj kostas unu peseton; unu respondkupono validas por du vortoj.

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio).